

ESPERANTO LANDO

Something for Every Member of the Family.

Io por Ĉiu Familiano.

III-a jaro.

Decembro - Februaro, 1932.

N-ro 10.

"Toler - avido Kaj Kunlaborado
Por La Tuta Homaro"

Ĉefredaktoro: [Editor] JOHN BOVIT.

Redaktoroj:

WARREN H. GOULD. GEORGO SAVILLE.

Ĉefkunlaborantoj:

Julia Goldzier, B. C. Miller,
E. Channing Polk, Berthold Schmidt.
Ruth E. J. Seavey, Frank S. Templin.
H. M. Tylick, Lawrence A. Ware.

ESPERANTO - LANDO (kvaronjara)

10 cendojn aŭ .50 svis. frk. unu numero
25 cendojn aŭ 1.25 svis. frk. tutjara abono.

1 Dolaron aŭ 5. svis frk. 5-jara abono.
Pagebla per respondkuponoj, aŭ per moneroj.
Redakcio kaj Administracio: 128 Market St.,
Suite 613-4, Newark, N. J. Usono.

ESPERANTO LANDO, estante sendependa
diskutejo, nek aprobas nek malaprobas la
ideojn de siaj kunlaborantoj kaj korespondan-
toj. Ĉiu sole respondas pri la opinioj espri-
mitaj super sia subskribo.

Malgrandaj reklamoj, aŭ anoncetoj (nur
antaŭpage) kostas po vorto 2 cendojn, mini-
nume 25 cendojn.

Represoj kaj tradukoj el Esperanto - Lando
estas permesataj, nur oni bonvolu indiki la
fonton, donante la plenan nomon, adreson,
kaj abonprezon kaj al ni sendu du ekzemplerojn.

Published quarterly by Universal Esperanto
Fraternity, Inc. Sec. H. M. Tylick 574 Jersey
Avenue, Jersey City, New Jersey, U.S.A.

The Esperanto Fraternity School meets
every second Saturday of each month from
6 to 9 P. M. at above address.

THE BIRTH OF ESPERANTO.

By L. L. Zamenof, Translated by Henry
W. Hetzel, President of Esperanto Associ-
ation of North America. Parallel text in
Esperanto and English. 24 pages. 10 cents.

Esperanto - Asocio de Norda Ameriko,
1591 Anderson Avenue, Fort Lee, N. J.

ENHAVO

Paĝo

<i>Kvaron - Jaro</i>	61
<i>In the Magazines</i>	63
<i>Sfero de Libroj</i>	64
<i>Demandoj kaj Respondoj</i>	64
<i>Astreca Epoko</i>	65
<i>Armistic - taga Proklamo</i>	65
<i>Historio de Homaro</i>	66
<i>Niaj Spritaj Samtempuloj</i>	69
<i>Negoca Situacio.</i>	70

LA KVARON-JARO.

MALPLIIGITAJ LABORTAGOJ.

La Amerika Federacio de Laboro, kiu havas 2,889,550 membrojn, ĉe sia 51-jara kunveno la 5-an de oktobro, 1931, en Vancouver, British Columbia, sugestas, parte, helpi la 7 milionojn da senlaboruloj jene:

"La laborhoroj estu malmultigitaj por dividi la haveblan laboron inter ĉiuj laboristoj. Ni taksas, ke se senlaboreco kaj part-tempa laboro pliiĝas tiom multe ĉi tiun vintron kiom en normalaj jaroj, ke en tia okazo estus proksimume 36 horoj da laboro, ĉiun semajne por ĉiu salajro-gajnanto en Usono. La universala starigo de 5-taga semajno donus postenojn al ĉiuj en la lando, kaŭzante ke ĉiu estu produktanto kaj konsumanto anstataŭ dependulo je kvazaŭ almozo aŭ almozo.

Estas kelkaj industrioj en kiuj la ŝanĝo de nunaj horoj al la 5-taga semajno ne estus malfacila, ĉar oni jam laboras nur 44 aŭ 48 horojn semaje. Sed en aliaj industrioj kaj multaj opaj fabrikoj oni ankoraŭ laboras 9 aŭ 10 horojn tage kaj 50 aŭ 55 horojn semajne, kaj kelkaj eĉ havas 11-horan tagon kaj 6-tag-an semajnon. Estas speciale grave, ke oni mallongigu la laborhorojn en tiuj fabrikoj por unu formigi la laborsemajnon por ĉiuj. Ĉi tiu projekto estas necesa por solvi la nunan krizon ĉi vintre. Estas eĉ pli necese ŝirmi nian ekonomi-

(Daŭrigita sur paĝo 72)

INTERNACIAJ KONFERENCJOJ.

Oktobro 22. Ĉefministro Pierre Laval de Francujo alvenas en New York sur la "Ile de France".

Oktobro 25. Malkaŝa diskuto inter Prezidanto Hoover kaj Ĉefministro Laval, dum tri tagoj, finiĝas per la elveno de kuna deklaro en ĝeneralaj vortoj: "Ni faris realan progreson. Ni esploris la ekonomian situacion en la mondo, la direktiĝojn en la internaciaj rilatoj apartenantaj ĝin, problemojn de la venonta kunveno por la limigado de bataliloj, la rezulton de la depremiĝo je la pagado de registaraj ŝuldoj, la stabiligadon de internaciaj interŝanĝoj, kaj aliajn financajn kaj ekonomiajn temojn.

Oktobro 27. Ĉefministro Laval forvojaĝas hejmen je tagiĝo sur la "Ile de France".

Novembro 1. Dudek-naŭ el la sesdek-tri nacioj invititaj al la Februara senarmig-konferenco estas akceptintaj la nunjaran arm-konstru-armisticon proponitan de la Ligo de Nacioj. Plejmulto el ili faris siajn aliĝojn, kondiĉe je la akceptado de aliaj nacioj. Pluaj akceptoj estas baldaŭ atendataj kaj la arm-libertempo estas konsiderata efikiĝi de Nov. 1.

Profesoro Albert Einstein skrikis al la Konferenco de Internacio de Kontraŭmilitistoj en Lyon, Francujo, ke "Vi reprezentas la movadon, kiu plej certe forigos militon. Mi alvokas al ĉiu viro kaj virino, eminenta kaj neeminenta, deklari antaŭ ol kunvenos la tutmonda Malarmado Konferenco en Geneva en Februaro, ke ili rifuzos doni ian helpon al milito aŭ milit-preparo en la estonteco. Mi petas ke ili diru tion skribe al sia registaro, kaj enregistriu tian decidon per skribo al mi dirante ke ili estas tion farintaj.

Mi atendas ricevi milojn da respondoj al ĉi tiu alvoko. Ili devus, esti adresitaj al mi ĉe Ĉefoficejo de War Resister's International, 11 Abbey Road, Enfield, Middlesex, England."

En La Revuo Orienta de Decembro ni legas, ke "Sro Masuzo Inoue, pasaĝer-agento de la Japana Ŝtat-fervojoj kaj laborema esperantisto baldaŭ vizitos Usonon." Ni ĝoje atendas lian alvenon.

Oktobro 10. La Virina Internacia Ligo por Paco kaj Libero donis sian senarmadan pet-skribon al Prezidanto Hoover. Fino Jane Addams, S-ino Catherine Blake, akompanitaj de 500 reprezentantoj el ĉiu de la 48 ŝtatoj, donis la dokumenton subsribitan de pli ol 150,000 personoj en Usono. Tiu Ligo donis identajn pet-skribojn al 40 diferencaj registaroj. En Japanujo preŝkaŭ unu miliono da personoj subskribis ĝin, kaj en Anglujo pli ol unu miliono da personoj subskribis ĝin. La pet-skribo legas jene:

"La viroj kaj virinoj subskribitaj, aparte de politika partio, estas konvinkitaj, ke konkurado en armado kondukas ĉiujn landojn al ruino sen donado de sekureco; ke tiu plano ne evitas estontajn militojn, kiuj estos militoj de ekstermado; ke registara certigo de pacema plano estas senvalora kiam la projektoj de senarmado estas prokrastataj. La alpreno de tiuj projektoj devas esti la unua rezulto de la interkonsento por la malkonfeso de milito.

"Ili, tial, petas la tutan kaj universalan senarmadon kaj postulas sian registaron instrukcii klare al ĝiaj delegitoj de la Internacia Senarmado Konferenco, kunvenonta je Februaro, 1932, por ekzameni ĉiujn projektojn de senarmado, proponitaj kaj proponotaj, kaj alpreni la necesajn projektojn por efektiviĝi realan senarmadon."

A V I A D O

Septembro 29. La Brita antaŭnelonge atingita rapidecrekordo estas denove superita de leŭtenanto G. H. Stainforth, kies mezrapideco estis 404.8 mejlojn hore. Lia plej granda rapideco en unu rondiro estis 415.2 mejlojn

[Daŭrigita sur paĝo 71]

IN THE MAGAZINES
En La Revuoj.
ESPERANTO.

The Evolution of Esperanto, by John Bovit in HARTFORD DAILY TIMES, August 26, 1931 page 10.

Esperanto Among Masons, by Fenton Stancliff and R. B. Heller in THE MASONIC BEACON, December 11, 1931 page 5.

AUXILIARY LANGUAGE.

Basic, by S. A. Leonard in SATURDAY REVIEW of LITERATURE, May 30, 1931 page 858.

New Need of an Auxiliary Language, by L. A. Mead, in EDUCATION February 1931 pages 372-6.

Wanted: a World Language, by E. Sapir in AMERICAN MERCURY February 1931 pages 202-9.

Widow of Ephesus; orthodox English Version Translated into Basic English, by L. W. Lockhart; with introduction by C. K. Ogden, Petronius, in FORUM February 1931 Pages 84-7.

Basic English, in LIVING AGE October 1931 pages 179-80.

Making a World Language of 850 words; Basic English in LITERARY DIGEST August 8, 1931.

BOOKS.

Linguistic Science in the 19th Century, by Holger Pederson. Authorized translation from the Danish by John Webster Spargo, Cambridge, Mass, Harvard University Press, 1931 \$5.00.

Kemp Malone in Saturday Review of Literature, October 24, 1931: "It is in reality a history (in 360 pages) of linguistic science from the earliest times to the present day. The work makes fascinating reading for learned and lay alike."

LYON CITY COUNCIL APPROVES ESPERANTO.

The city council at Lyon, France, on September 21, unanimously adopted the following resolution:

"Whereas as long as people are able to express their ideas in their respective national languages only, the peace movement and all attempts to bring people together internationally will remain in vain:

"Now, therefore, the City Council of Lyon, France, asks that in all public and private schools of the world the teaching of the international auxiliary language Esperanto be made compulsory."

THE ROTARY WHEEL, monthly English Language magazine of the Rotary Club International, has been printing a summary of its contents in Esperanto since September 1931. Mr. D. P. Poatman, prominent London Rotary official, has recommended that every Rotarian who expects to be a delegate at the coming congress in Paris should be required to learn Esperanto.

MONDAMIKECO (World-Friendship), the bulletin of the Rotaria Esperanto Amikaro (Rotary Esperanto Friendship Group) is now appearing in printed form. It was before a mimeograph sheet.

<p>NEW YORK ESPERANTO SOCIETY meets the First Saturday of each month at 6:45 P. M. at Hotel Endicott, Columbus Ave., at 81st Street, New York City. Visitors are invited.</p>	<p>CLASS TO LEARN ESPERANTO held every Tuesday at 8 P. M. at 119 West 57th Street, Suite 620, New York City. Visitors are invited.</p>
---	--

LA SFERO DE LIBROJ

The Sphere of Books

La redakcio tre volonte publikas kontraŭopiniojn, koncerne kiun ajn aperintan recenzon. La libroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofaĝo de nia eldono.

Deguĉi, Onisabro. Fundamento de Animo. Esperantigis kaj eldonis Omoto - Propaganda Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo, 1931. 48p. 18 x 13cm. Prezo inklusive afranko: Sv. Fr. 1. aŭ 20 cents.

La eldonisto opinias, ke tiu verko "plene pritraktas la instruojn de Omoto pri post morta vivo, Ĉielo, Infero . . . sen kies kono homo neniam povas akiri veran trankvilecon, kaj estas vere mirinda verko super homa cerbo."

La fotografaĵo de la aŭtoro, kiu havas 60 jarojn, ornamas la unuan paĝon de la broŝuro.

En la tria ĉapitro, paragrafo naŭa, la aŭtoro konstatas:

"Homoj posedas en si unu spiriton kaj kvar karakterojn, kiuj estas: ĉefspirito, karakteroj de kuraĝeco, intimo, saĝeco kaj amemo. La ĉefspirito regas tiujn-ĉi kvar karakterojn. Kiam la karakteroj bone funkcias por bono, amo kaj vero, tiam la stato de la homo estas komplete virta; homoj de tia animo rekte sin levas en la Ĉielon post la morto de la korpo. Sed tiuj, en kiuj nur tri el la nomitaj karakteroj funkcias bone, estas la trivirtuloj kaj tiuj, en kiuj nur du aŭ unu el la karakteroj funkcias bone, estas, respektive, la du aŭ unuvirtuloj. Ili okupas pli malpli altan pozicion en la Ĉiela Regno ĝuste laŭ tiu-ĉi kriterio. Fine tiuj, kiuj eĉ ne atingas la gradon de unuvirteco, vagas en la Intera Regiono.

En la kvara ĉapitro, paragrafo sepa, la aŭtoro konstatas:

"Tiu - ĉi misteroj ne povas esti komprenataj de homa cerbo en kelkaj mallongaj frazoj. Ili estas super la komprenpovo de la modernaj homoj eĉ se ili estas ĝuste kaj precize klarigataj. Laŭ mia opinio, neniu sanktulo aŭ filozofo povas ekkoni la verajn statojn de la Ĉielregno kaj de la Spirita Mondo, ĉar ili estas absolutaj, nemezureblaj kaj senfinaj, tute same kiel la Universo mem."

John Eovit.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ.

de Pastro B. C. Miller.

1. Ĉu ni devas lasi la vorton, "agnoski," fariĝi arkaikaĵo kaj anstataŭi ĝin ĉie per "akcepti"?
2. Ĉu ne montras "kien, antaŭen," kaj aliaj adverboj, ke la "n" de direkto ne estas akuzativo, ĉar nenia adverbo iam prenas la akuzativon?
3. Zamenhof diris: "Re montras revenon al la loko aŭ al la stato, de kiu oni iris." (L. R., p25). Sed, ĉu ne "Re" ankaŭ signifas "for de"?

EPOKOJ DE VIVO SUR TERO EPOCHS OF LIFE UPON EARTH

kiuj estas partoj de
Rakontoj pri la Unuaj Bestoj.
de EDITH B. WALKER

kun kunlaboro de CHARLES C. MOOK, Doktoro pri Filazofio

I LA ASTRECA EPOKO.

- | | |
|---|--|
| 1. <i>Milionojn da jaroj antaŭ de nun,</i> | 2. <i>Tiun eonon nomas epok'</i> |
| <i>Antaŭ ol ja estiĝis la mond',</i> | <i>Astreca la homoj ĝin studantaj.</i> |
| <i>Ne estis acro, nek ter' nek mar',</i> | <i>La ter' estis sfer' svingiĝa en spac'</i> |
| <i>Nek homo en tuta la rond'.</i> | <i>De vaporoj kaj gasoj gigantaj.</i> |
| 3. <i>Aerolitoj falegis el la ĉiel'</i> | |
| <i>Kaj portis rakontojn pri mondoj de alte;</i> | |
| <i>Dum viviĝis l'atomoj sencelaj en mar'</i> | |
| <i>Kaj en ĉielo kaj ter, senhalte.</i> | |

(Daŭrigita sur pago 77)

Esperantigis Berthold Schmidt.

ARMISTIC - TAGA PROKLAMO. Armistice Day Proclamation.

Tradukis Julia Goldzier.

Prezidanto Hoover eldonis proklamon vokante la civitanojn de Usono, ke ili solenu per ceremonioj, la 11-an de Novembro kiel Armistic-tago kaj ke ili promesu klopodi "por eternigi la pacon de la mondo". La proklamo sekvas:

Pro tio ke la 11-an tagon de Novembro 1918, markas la finon de la mond-milito kaj la ĉeson de ĝia detruado kaj suferado; kaj

Pro tio ke decas, ke la reokazantaj dat-revenoj de tiu ĉi tago estu rememorigitaj per faradoj honorigante tiujn, kiuj oferis siajn vivojn en la servo de sia lando; kaj dediĉante nin mem al la atingo de la idealoj de justeco, libereco kaj paco por kiu ili faris la plej-superan oferon; kaj

Pro tio ke per sam-tempe farita rezolucio de la Senato kaj la Ĉambro de Reprezentantaro, en la jaro 1926, oni petis la Prezidanton, ke li eldonu proklamon por la soleno de armistic-tago:

Nun do, tial, mi, Herbert Hoover, Prezidanto de la Usono, laŭ la menciita rezolucio, jen ordonas, ke la Usona flago estu elmontrita sur ĉiu registra konstruaĵo la 11-an de Novembro, 1931; kaj mi ja invitas la popolon de Usono, ke ili solenu la tagon en siaj preĝejoj kaj lernejoj kaj aliaj konvenaj lokoj per decaj ceremonioj, esprimante nian dankemon, ke paco estiĝas, kaj dediĉante nin mem al la klopodo eternigi pacon en la mondo kaj kulturil-rilatojn de amikeco kaj hom-amo inter ĉiuj nacioj.

Atestante al tio, mi metis mian manon kaj alfiksogis la sigelon de Usono.

Farite ĉe la urbo Washington la duan de Novembro en la jaro de nia Sinjoro, 1931, kaj de la sendependeco de Usono, en la jaro 156-a.

(Subskribite) *Herbert Hoover.*

LA HISTORIO DE HOMARO. THE STORY OF MANKIND.

de Hendrik Willem Van Loon

Elangligis Georgo Saville.

Ĉapitro 63.

NOVA MONDO.

La Granda Milito Kiu Vere Estis Batalo Por Nova Kaj Pli Bona Mondo.

La markizo de Condorcet estis unu el la plej noblaj karakteroj en la tuta grupo da honestaj entuziasmuloj kiuj kaŭzis la eksplodon de la granda Franca Revolucio. Li estis dediĉinta sian vivon al la afero de l'malriĉuloj kaj malfeliĉuloj. Li estis unu el la helpantoj de d'Alembert kaj Diderot kiam ili verkis sian faman enciklopedion (Encyclopedie). Dum la unuaj tagoj de l'revolucio li estis la gvidanto de la moderula flanko de l'Popola Kunvenintaro.

Lia toleremo, lia ĝentileco, lia forta prudento, kaŭzis ke li estu suspekta kiam la perfido de la reĝo kaj la kortuma rondeto estis oferinta al la ekstremaj radikaluloj ilian ŝancon por kapti la registaron kaj mortigi iliajn kontraŭulojn. Oni deklaris ke Condorcet estas proskripciulo (hors de loi) aŭ elpelito kiu estas ĉe la indulgo de ĉiu vera patrioto. Liaj amikoj oferis sin por kaŝi lin. Li rifuzis akcepti ilian oferon. Li forkuris kaj penis atingi sian hejmon, kie li estus eble sekura. Post trinokta vagado, ĉifonita kaj sangmakulita li eniris drinkejon por postuli manĝaĵon. La suspektaj kamparuloj traserĉis lin kaj trovis en lia poŝo ekzempleron de Horaco, la latina poeto. Tio montris ke ilia kaptito estas homo ĝentile edukita kaj ke li ne havas rajton sur la ŝoseoj en periodo kiam ĉiu edukita persono estis rigardata kiel malamiko de la revolucia ŝtato. Ili prenis Condorcet, ĉirkaŭligis lin, ŝtopis lian buŝon kaj ĵetis lin en la vilaĝ-karceron; sed matene, kiam la soldatoj venis por retiri lin al Parizo por ke oni povu tie fortranĉi lian kapon, jen! li estis mortinta. Tiu homo kiu donis ĉion kaj ricevis nenion havis bonan kaŭzon por malesperi pri la homa raso. Sed li estis verkinta kelkajn sentencojn kiuj sonas tiel vere hodiaŭ kiel ill sonis antaŭ 130 jaroj. Mi ripetas ilin ĉi tie por via profito.

"Naturo ne limigis niajn esperojn", li skribis, "kaj la bildo staranta antaŭ ni kiu prezentas la homan rason, nun liberiĝintan je ĝiaj ĉenoj kaj marŝantan per firma paŝado sur la vojo de vero kaj virto kaj feliĉo, ofertas al la filozofo vidaĵon kiu konsolas lin pro la eraroj, pro la krimoj kaj la maljustaĵoj kiuj ankoraŭ malpurigas kaj afliktas tiun ĉi teron".

La mondo estis ĵus pasinta tra agonio dolora kompare al kiu la Franca Revolucio estis nur flankajo. Tiu skuo estis tiel granda ke ĝi mortigis la lastan eron esperan en la brustoj de miliono da homoj. Ili estis kantetantaj himnon al progreso, kaj kvar jaroj da buĉado sekvis ilian preĝadon al paco. "Ĉu valoras", ili demandas, "laboregi por la profito de kreaĵoj kiuj ne estas ankoraŭ preterpasintaj la stadion de la plej fruaj kaverno-homoj?"

Estas nur unu respondo.

Tiu respondo estas "Jes"!

La Monda Milito estis terura katastrofo. Sed tio ne signifas la finon de

ĉiuj aferoj. Male, tio venigis la novan tagon.

Estas facile verki historion pri Greklando kaj Romo aŭ pri la Mezaj Jarcentoj. La aktoroj kiuj ludis siajn rolojn sur tiu longe forgesita scenejo estas ĉiuj mortintaj. Ni povas kritiki ilin per flegma kapo. La ĉeestantaro kiu aplaŭdis iliajn penojn estas malaperinta. Niaj rimarkoj ne povas dolorigi iliajn sentojn.

Sed estas tre malfacile verece pri-kribi onies-tempajn okazaĵojn. La problemoj kiuj plenigas la mensojn de la homoj kun kiuj ni vivas estas niaj propraj problemoj, kaj ili aŭ dolorigas nin tro multe aŭ ili plaĉas al ni tro multe por ke ni povu priskribi ilin per tia justeco kia estas necesa kiam oni estas verkanta historion kaj ne blovanta trumpeteton propagandan. Tamen mi penos diri al vi kial mi konsentas kun kompatinda Condoreet kiam li esprimis sian firman fidon je pli bona estonteco.

Ofte, antaŭ tio ĉi, mi estis averanta vin kontraŭ la malvera impresoj kiu kreiĝas per la uzo de niaj t. n. epokoj historiaj kiuj dividas la historion homan en kvar partojn: la Antikva Mondo, la Mezaj Jarcentoj, la Renesanco, la Reformacia kaj la Moderna Epoko. La lasta el tiuj ĉi terminoj estas la plej danĝera. La vorto "moderna" sugestas ke ni, la homoj de la 20-a jarcento, estas ĉe la supro de homa atingo. Antaŭ 50 jaroj la liberaluloj Angliaj kiuj sekvis la gvidon de Gladstone sentis ke la problemoj de vere reprezentiva kaj demokratia formo registara estis por ĉiam solvita per la dua granda Reform-leĝo, kiu donacis al laboristoj egalan rajton en la registaro kun iliaj mastroj. Kiam Disraeli kaj liaj konservativaj amikoj parolis pri danĝera "salto en la mallumo" ili respondis "ne". Ili estis certaj pri sia afero kaj fidis ke de post tiam ĉiuj klasoj sociaj kunlaborus por sukcesigi la registaron de sia komuna lando. De post tiam multo okazis, kaj la kelkaj liberaluloj kiuj ankoraŭ vivas estas ekkomprenintaj ke ili eraris.

Al neniuj historiaj problemoj estas definitiva respondo.

Ĉiu generacio devas aŭ deŝovi batali la lonan batalon aŭ ĝi devas pereigi same kiel tiuj malviglaj animaloj prahistoriaj pereis.

Tiel baldaŭ kiel vi ekkomprenos tiun grandan veron vi ekkaptos novan kaj multe pli larĝan opinion pri vivo. Poste iru unu paŝon pli antaŭen kaj penu imagi vin en pozicio de viaj propraj pra-pranepoj kiuj prenos vian lokon en la jaro 10,000. Ankaŭ ili lernas historion. Sed kion pensos ili pri tiuj ĉi mallongaj 4,000 jaroj dum kiuj ni estis tenantaj skrib-kronikon pri niaj agoj kaj pri niaj pensoj? Ili pensos pri Napoleono kiel pri samtempulo de Tiglath Pileser, la asira konkerulo. Eble ili konfuzos pensos ke li estis Jenghiz Khan aŭ Aleksandro la Makedonano. La granda milito kiu estis ĵus finiĝinta aspektas al ili kiel tiu longa konflikto komerca kiu solvis la superregecon de la Mediteraneo kiam Romo kaj Kartago batalis dum 128 jaroj pro la estreco de la maro. La Balkanaj ĉagrenoj 19-jarcentaj (la lukto pro libereco de Serbio, Greklando, Bulgario kaj Montenegro) ŝajnos al ili kiel daŭrigo de la malordaj cirkonstancoj kaŭzitaj de la Grandaj Migradoj. Ili rigardos la bildojn de la Rheims katedralo, kiu kvazaŭ hieraŭ estis detruita de germanaj kanonoj, same kiel ni rigardas fotografiaĵon de la Akropolis kiu estis detruita antaŭ 250 jaroj dum milito inter turkoj kaj venecianoj. Ili konside-

ros la morto-timon, kiu ankoraŭ regas ĝenerale inter multaj homoj, kiel infanecan superstiĉon kiu estis eble natŭra al raso homa kiu estis bruliganta sorĉistinojn tiel malfrue kiel 1692. Eĉ niaj hospitaloj kaj niaj laboratorioj kaj niaj operaci-ĉambroj, pro kiuj ni tiel fieras, aspektus al ili kiel iomete plibonigitaj laborejoj de alĥemiistoj kaj mezepokaj ĥirurgoj.

Kaj la kaŭzo pro ĉio tio estas simpla. Ni modernuloj tute ne estas "modernaj". Male, ni ankoraŭ apartenas al la lastaj generacioj de la kaverno-homoj. La fundamento por nova epoko estis ĵus hieraŭ konstruita. La homa raso estis ekhavinta sian unuan ŝancon al vera civilizacio kiam ĝi ekkuraĝis dubi pri ĉiuj aferoj kaj akceptis "scion kaj komprenon" kiel fundamenton sur kiu oni kreu pli racian kaj inteligentan socion por homoj. La Granda Milito estis al "naskdoloro" al tiu nova mondo.

Dum longa tempo post ĝia fino oni estos verkantaj egajn librojn por pruvi ke ĉi tiu, tiu aŭ la alia persono kaŭzis la militon. La socialistoj publikigos volumojn en kiuj ili akuzos la "kapitalistojn" ke tiuj kaŭzis la militon pro "gajno komerca". La kapitalistoj respondos ke ili perdis multe pli pro milito ol ili gajnis -- ke iliaj filoj estis inter la unuaj kiuj iris kaj batalis kaj mortis -- kaj ili elmontras kiel en ĉiu lando la bankistoj penis ti-kiel ili povis forteni la eksplodon de militado. Francaj historiistoj tracistos la registron de germanaj pekoj de post la tagoj de Karломagno ĝis la tagoj de Vilhelmo de Hohenzollern kaj germanaj historiistoj redonos la komplimenton kaj tracistos la liston de francaj abomenaĵoj de post la tagoj de Karломagno ĝis la tagoj de prezidanto Poincare. Kaj post tio ili konstatos al sia propra kontentigo ke la aliulo kulpis "kauzinte la militon".

La historiisto, cent jarojn poste, ne zorgos pri tiuj apologioj kaj pravigoj. Li komprenos la efektivan eĉon de la fundamentaj kaŭzoj kaj li scios ke personaj ambicioj kaj persona maliceco kaj persona avareco malmulte rilatis al la fina eksplodo. La origina eraro, kiu estis respondeca pro ĉiu tiu malfeliĉo, estis farita kiam niaj scienculoj ekkreis novan mondon de ŝtalo kaj fero kaj ĥemio kaj elektro kaj forgesis ke la homa menso estas pli malrapida ol la proverba testudo, ĝi estas pli malenergia ol la bone konata bradipo #, kaj ĝi marŝas de 100 ĝis 300 jarojn malantaŭ la eta grupo de kuraĝaj gvidantoj. Zululandano per frako vestita estas tamen nur zululandano. Hundo dresita por rajdi sur biciklo kaj fumi pipon estas tamen nur hundo. Kaj homo posedanta menson de 16 - jarcenta komercisto, eĉ se li vetuigas Rolls Royce aŭtomobilon, estas tamen nur homo posedanta menson de 16 - jarcenta komercisto.

Se vi ne tuj ekkomprenus, relegu tion ĉi. Ĝi tuj klariĝos al vi kaj vi ekscios multajn aferojn kiuj okazis en ĉi lastaj ses jaroj.

Eble mi povus doni al vi alian, pli familiaran, ekzemplon por montri al al vi kion mi volas diri. En kinomatografejo oni ofte ĵetas sur la ekranon

(Daŭrigita sur paĝo 78)

BILDARO LAŬ EKZERCARO
from SPOKEN ESPEARNTO for
beginners. 10 copies for \$1. 100
copies for \$5.
Norman W. Frost, Brownfield, Maine.

**ENGLISH - ESPERANTO
VOCABULARY.**

A dictionary containing 3,600 English words
that are translated into Esperanto. 10 cents
per copy. 4 copies for 25 cents. ESPERANTO
LANDO, 128 Market St., Newark, N. J.

NIAJ SPRITAJ SAMTEMPULOJ.

OUR WITTY CONTEMPORARIES.

Kompilis kaj Esperantigis Viktor Klinton.
La Sekreto de Feliĉo.

46. Se vi povus enamiĝi kun indega persono, indega laboro, indega movado, vi fariĝus feliĉa. Persono estas indega, nur kiam li sin interŝiĝas pri io indega ekstere sin mem, Profesoro Harry Overstreet.
47. Zorgu pri la estanteco, kaj la estonteco zorgos pri vi.
48. "Kio estas plej malproksima, Azio aŭ la luno?"
"Azio, ĉar oni povas vidi la lunon, sed oni ne povas vidi Azion."
Hamilton Herald.
49. Infano: "Paĉjo, je kiu aĝo mi povas agi kiel plaĉas al mi?"
Paĉjo: "Mi ne scias. Neĉiu vivis tiel longe ankoraŭ." Troy-Times.
50. "Karulo, rigardu, mi trovis malnovan kalkulon kvitancitan."
"Lusu min esplori ĝin, Mi ne vidis tian kalkulon dum unu jaro."
51. "Kiu estas viaj vidpunktoj pri kisado?"
"Mi ne havas vidpunktojn. Mi ĉiam fermas miajn okulojn."
52. "Kiujn dentojn oni obtenas laste."
"Arte faritajn dentojn."
53. "Kia kuko estas tio?"
"Lucifera kuko, karulo."
"Vi diris al mi, ke vi bakos anĝel-kukon."
"Mi intencis tion, sed la kuko falis." — Stray Stories.
54. "Ĉu via infaneto jam lernis paroli?"
"Certe, ni nun instruadas lin per kvietiĝi." Cornwall Advertiser
55. Malgranda knabo, kondukante azenon, preter-pasis armean tendejon. Kel'kaj soldatoj deziris moki lin.
"Kial vi tiel zorgeme tenas vian fraton?" demandis unu soldato.
"Por ke li ne aliĝu la armeon, la junulo respondis. — The Baptist.
56. "Kion vi aŭdis ĉe la operejo hieraŭ?"
"Ciajn aferojn: Smit bankrotiĝis; Sinjorino Bruno kolorigis siajn harojn; gesinjoroj Blanko eksedziĝas."
Passing Show.

HILDEBRAND: El la "Camera Obscura".

El la holanda originalo tradukis H. C. Mees, 64 pagoj. Kartonita, 25 cendoj. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, Cl, Salomonstrasse 15. Germanujo. Esperanto-Lando, 128 Market Street, Newark, New Jersey, Usono.

LONDON: Fera Kalkanumo. El la angla originalo tradukis Georgo Saville, 362 pagoj. Bindita. \$1.10 Sennacieca Asocio Tutmonda, Kolmstrasse 1, Leipzig, 0 27, Germanujo. Esperanto-Lando, 128 Market Street, Newark, N. J. Usono.

LABORO DE USONO

Aŭgusto 19. La Prezidanto de Usono nomis Walter S. Gifford, prezidanton de la Amerika Telefona kaj Telegrafa Kompanio, kiel estron de organizo por malpliigi la senlaborecan krizon ĉi tiun vintron. Li instrucas al S-ro Gifford kunordigi la penojn de nacia, ŝtata, kaj loka organizoj jam okupitaj pri senlaboreca helpo. Lastjara Komitato por Senlaboruloj estos kunligita kun la nova organizo.

Estas taksite, neoficiale, ke preskaŭ 10,000,000 personoj estas senlaboraj; pliigo je ĉirkaŭ 200% super la nombro por Aprilo 1930.

Septembro 22. Kvin grandaj korporacioj en tri pligravaj industrioj, Usona Ŝtalo, Bethleĥem Ŝtalo, Youngstown Lameno kaj Tufo, Ĝeneralaj Motoroj, kaj Usona Kaŭcuko, faras salajromalgrandigojn. La Ŝtalaj korporacioj malgrandigos salajrojn je 10%, la unua malgrandigo de post 1921. Usona Kaŭcuko ankaŭ anoncas komencon je kvintaga semajno de Oktobro 1-a. Estas taksite, ke la malgrandigoj tuŝos pli ol milionon da laboristoj.

Oktobro 29. Ford Motor Kompanio malgrandigas salajrojn de minimumo je \$7.00 tage al \$6.00 tage. Ili estis pligrandigitaj je tiu ĉi sumo Decembron 1, 1929, responde al la peto de la Prezidanto teni la salajrojn alte post la akcia falego. La nova salajro estas sama kiel tiu pagita dum la tempo de plej granda prospero.

Novembro 11.....Usono, havante tro multe da oro, estas malriĉa. Ĝi estas tiel malriĉa, ke ĝi ĉagreniĝas, ĉar multaj de ĝia popolo estas tre malsantaj kaj multaj aliaj havas tiel multe da nutraĵo, ke ili ne povas uzi ĝin aŭ vendi ĝin.

(Ĉefartiko de Newark Evening News)

Tradukis Lawrence A. Ware.

NEGOCA SITUACIO.

Negoca Situacio en Usono Resumita de Departementoj de la Registaro de Usono kaj de aliaj Aŭtoritatoj. Mezo 1923 - 5 estas 100 procentoj. Aranĝis John Bovit.

1931

Negoc - semajno indekso de meza	Aŭgusto	Septembro	Oktobro	Novembro
Negoca aktiveco	72	71	70	66
Bankrotaj	a 1,944	1,936	2,362	2,195
Pasivoj ĝiaj, en 1,000 dolaroj	53,025	40,256	70,660	60,659
Bankaj ĉesigoj, de Federal Reserve	a 38	62	124	
Deponoj ĝiaj en 1,000 dolaroj	105,210	127,458	279,470	
Bankaj ĉesigoj, ne aliĝitaj al F. R.	a 116	236	388	
Deponoj ĝiaj en 1,000 dolaroj	120,812	143,801	287,216	
Bank - Debetoj en milionoj da dolaroj ekstere				
Nov - jork Urbo	16,526	16,627	18,125	
Bankaj prunt - donoj kaj diskontoj				
Ŝarĝvagonoj uzitaj	72	69	69	
Eksportado, en milionoj da dolaroj	164	180	205	193
Importado, en milionoj da dolaroj	166	170	168	150
Produktado de seg - ligno	40	38	35	
Konstruado - Kontraktoj, valoro	59	59	55	
Landovendado	59	51	51	
Okupigo	74	73	70	
Kosto de vivo	85	85	84	
Prezo de kotono, meza kvalito, Nov-jore pofunto	\$.07	\$.06	\$.06	
Prezo de kupro, elektrolitema po funto	\$.07	\$.06	\$.06	
Prezo de tritiko po buŝelo	\$.51	\$.56	\$.58	
Akciaj prezoj de ĉiu grupoj, 404	96	82	70	
Obligaciaj prezoj, 60 obligacioj	98	95	89	
Rentuma procento, tempa mono				
a Aktuala nombro dum la tuta monato.				

SinJORINO Kate B. Seavey, samideanino, je la aĝo de 69, mortis en Lowell, Massachusetts. Ŝi estis instruistino en la publikaj lernejoj 14 jarojn. Ŝi interesiĝis pri Esperanto per lecionoj de Sino W. F. Crafts en "Christian Herald" en 1908. Ŝi estis abonantino de "The Esperanto Student" ĝis ties malapero. Ŝi estis abonantino de "Amerika Esperantisto" kaj "Esperanto-Lando." Ŝi ĉeestis la 14-an kaj 23-an E. A. N. A. kongresojn en Boston. Ŝi verkis himnon, "Lingvo de la Bela Paco" kiun kantis ŝia filino, Ruth, ĉe la 23 a. En 1929 - 30 ŝi direktis Esperanto-klason inter gejunuloj en Dracut, Massachusetts. La esperantistaro danke memoros tiun fidelan samideaninon kaj prioniriron. Sinceran kunsenton!

(Daŭrigita de paĝo 62)

hore.

Oktobro 4,5. La Pacifika Oceano estas transflugita unuafojon de Japanujo ĝis Usono. Clyde Pangborn kaj Hugh Herndon, Jr. surteriĝis ĉe Wenatchee, Washington. Ili estis forlasintaj Shabishiro, Japanujo. La flugado kovris 4600 mejlojn.

SCIENCO EN 1931

Profesoro Harold C. Urey kaj Doktoro G. M. Murphy de Columbia Universitato kaj Doktoro F. C. Brickwedde de Usona departemento de normoj en Washington eltrovis la hidrogenan isotropon, novan atomon, kiu estos grava en la studado de atoma strukturo.

Doktoroj F. B. Downing, H. W. Carothers, kaj Ira Williams eltrovis "dupreno," sintezan kaŭĉukon konvenan po komerca produktado.

ARKITEKTURO.

Okt. 24 La George Washington Ponto (Georgo Vaŝington) estas malfermita. Ĝi transpasas la Hudson-Riveron de Fort Lee, New Jersey (Fort Li Nju Ĝerzi) ĝis 178-a strato en Manhattan, New York, (Nju Jork). La etendo estas 3,500 futojn. Ĝi estas la plej longa pend-ponto en la mondo. Ĝin planis Athmar Hermann Ammann, ĉefa pont-inĝeniero de la "Port de New York Authority". La konstruado daŭris dum kvar kaj duono jaroj. Ĝin posedas kaj funkciigas la "Port de New York Authority". La kosto estas 60, 000, 000 dolaroj.

Trad. L. A. Ware.

WORLD UNITY

Interpreting the Spirit of the Age

John Randal, Editor. Horace Holley, Managing Editor.

Published monthly, 25 cents a copy, \$2.50 a year

4 East 12th Street, *New York City.*

(Daŭrigita sur pago 61)

an estontecon. Se modernaj industriaj plibonigoj ne bilanciĝas per la malpliigado de labor-horoj ni havos konstantan pliiĝon en teknologia senlaboreco. Doni al la laboristoj libertempon anstataŭ senlaborecon signifas moralan kaj spiritan progreson por la popolo de Usono."

Tradukiis Lawrence A. Ware.

REFORMOJ SUGESTITAJ.

Aŭgusto 10. La Vickerŝama Komisiono publikigis la "nudajn malbelajn faktojn" pri naci-larĝa polica krueleco en la konduto kontraŭ suspektitaj krimuloj.

Aŭgusto 16. En sia plej longa raporto, 250,000 vortoj, la Vickerŝama Komisiono trovas, ke la kaŭzoj de krimo estas treege komplikitaj. Tamen la raporto enhavas decidojn de spertuloj kiuj konstatas, ke la kaŭzoj estas senokupeco, politika influo en leĝ-administrado, malalta inteligenteco, malbonaj ĉirkaŭaĵoj, maldeca familia vivo, kaj la konplikita sistemo de leĝoj.

Aŭgusto 21. La Amerika krim-kalkulo estas tiel granda kaj tiel nedefinita, ke oni ne povas ĝin kalkuli, laŭ la dek-dua Vickerŝama raporto, kiu ĝin taksas je pli ol \$1,000,000,000 jare. Organizita elpreamado de mono de timigit-oj estas tia granda forto, ke la Komisiono konsilas apartan usonan enketon. Malpermeso de trinkado, oni trovas, kostas ne malpli ol du-trionoj de la tuta kosto de usona polica administrado, kiu sumis \$52,785,202 en la financa jaro, 1929-1930.

Aŭgusto 23. Post dujara enketo, la Vickerŝama komisiono konstatas, ke la fremd-naskitoj, al kiuj preskaŭ ĉiu kutime akuzadas la pli grandan parton de krimeco, efektive "faras malmultajn krimojn ol la Uson-naskitoj." Oni studis 4,000,000 krimulojn.

Esperantigis E. Channing Polk.

MORTIS.

Augusto 26. Frank Harris, 75, en Nico, Francujo. Li naskiĝis la 14-an de Februaro, 1856, ĉe Galway, Irlando. Post 15 jaroj, li venis al Nov - Jorko. Li laboris sur la fundamentoj de la Brooklyn Ponto. Li estis paŝtisto en la okcidento. Li estis studento ĉe la Universitato de Kansas. Li fariĝis advokato en Lawrence, Kansas, 1875, sed li forlasis sian juran karieron post du jaroj. Li estis ribelo, ikonoklasto, kaj aŭtoro konata. "Mia vivo kaj amoj," gajnis por li gradon de famo. La usona post-oficejo rifuzis ekspedi tiun libron. "Samtempulaj Portretoj," estis pri liaj literaturaj samtempuloj. Liaj aliaj verkoj estas: Vivo de Oscar Wilde, La homo Ŝekspir, Biografio de Bernard Shaw.

Aŭgusto 29. Francis M. Bellamy, 75, en Tampa, Florido. En 1892 li verkis La ĵuro al la Flago, kiun miloj da gelernantoj kaj patriotaj societoj ripetis. La teksto sekvas:

"Mi ĵuras lojalecon al la flago de la Usono, kaj al la respubliko por kiu gi staras. Unu nacio nedividebla, kun libereco kaj justeco por ĉiuj."

Oktobro 18. Thomas A. Edison, 84, en West Orange, N. J. Li naskiĝis en Milan, Ohio, la 11-an de Februaro, 1847. Liaj plej gravaj elpensajoj estis: la fonografo, 1877; la elektra lampo, 1879; la elektraj pelitaj tramoj, 1882; kaj la mov-bilda fotografilo, 1891. Li estis mond-fama persono.

Tradukiis Pastro B. C. Miller.